# *Kubo Sano 2015: kongreso kaj foiro por ?iuj.*



En la Kongresa Palaco de Havano eksesios ?is vendrede la kongreso kaj foiro de sano por ?iuj, kun preska? 2 mil delegitoj kaj invititoj el ?iuj kontinentoj, malfermita ?i-lunde.

José Ramón Machado Ventura, vicprezidanto de la ?tata kaj ministra konsilantaro de Kubo, ?eestis la malferman ceremonion de la II-a Kongreso Internacia Kubo Sano 2015.

La partoprenantoj ricevis saluton senditan de la doktorino Margaret Chang, ?enerala direktorino de la monda organizo pri sano, kiu la?dis la kuban sansistemon, ties universalan atenton kaj konfirmis sian agnoskon al la registaro kaj popolo de la insulo pro ties kontribuo al batalo kontra? la viruso de Ebolo en Okcidenta Afriko.

La doktorino Isabel Danell, direktorino adjunkta de la tutamerika organizo pri sano, la?dis la rolon de Kubo en la kontinento, aparte pro la elradikigo de malsanoj kiel poliomjelito kaj aliaj.

?i elstarigis ke Kubo estas la unua lando en la mondo kiu trapasas la validigan procezon cele al elimino de tramsmisio infan-patrina de malsanoj kiel sifilizo kaj aidoso.

La doktoro Roberto Morales, ministro pri publika sano, faris specialan prelegon kiu montris la ?efajn atingojn kaj defiojn de la kuba sansistemo, celanta trasdoni efikan kaj kvalitan servon al la civitanaro.

Li emfazis ke la evoluceloj de la Jarmilo establitaj de UN estas plenumitaj kaj da?re iras anta?en, kiel esprimo de la streboj de la insulo en tiu ?i agadkampo, tiel ke oni disponigas 22% de la ?tata bu?eto al la sansistemo.

Li raportis pri la formado de profesiuloj ne nur por Kubo, sed por multaj aliaj landoj, entute 39 mil kuracistoj el 121 landoj, el ili 24 mil en la kuba latinamerika lernejo pri medicino.

La ministro anka? raportis pri la  medicina kunlaboro de pli ol 325 mil gelaboristoj pri sano en 159 landoj dum pli ol 40 jaroj, surbaze de internaciismaj kaj solidaraj principoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/53364-kubo-sano-2015-kongreso-kaj-foiro-por-ciuj

**Radio Habana Cuba**